PILO-PRESS
Internacia
Informservo
N-ro 15/1974 25 aprilo 1974
Aperas ĉiusemajne

Jus aperis la romano
NUDA INTER LUPOJ
de Bruno Apitz
Prezo 12,- DM
Mendu ĉe
Pilo-Press

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Esperanto-movado funebras pri Franz Jonas

Vieno (pp) En la nokto de 23/24 aprilo 1974 mortis la prezidento de Aŭstrio, Franz Jonas, unu el la plej eminentaj esperantistoj de la nuntempo, en la aĝo de preskaŭ 75 jaroj.

Franz Jonas, estante kompostisto, lernis Esperanton en la dudekaj jaroj kaj aktivis en la laborista Esperanto-movado de Aŭstrio. De 1932 ĝis 1934 li funkciis kiel vicprezidanto de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, kies "vera animo" Franz Jonas estis laŭ Enciklopedio de Esperanto.

Sed Franz Jonas restis esperantisto kaj samideano ankaŭ, kiam li post la milito fariĝis urbestro de Vieno kaj 1965 ekokupis la plej altan ŝtatan funkcion. Ankaŭ en tiuj oficialaj funkcioj li ĉiam identigis sin kun Esperanto. Dum siaj ŝtatvizitoj li invitis ankaŭ regule reprezentantojn de la koncernaj Esperanto-asocioj kaj interparolis en Esperanto kun ili dum oficialaj akceptoj. Pilo-Press raportis siatempe pri tio. Bone ni memoras ankaŭ la interparolon kun ambasadoro Ralph Harry, la aŭstralia reprezentanto, okaze de lia ŝtatvizito en Bonn pasintjare. Freŝaj estas ankoraŭ liaj salutvortoj al la tutmonda esperantistaro okaze de la jarŝanĝo 1973/1974, parolitaj en la Esperanto-elsendoj de la kurtonda servo de radio Vieno.

Neforgeseblaj restos liaj saĝaj kaj kuraĝigaj vortoj, kiujn li direktis al la esperantistaro kaj al la neesperantista publiko okaze de la malfermo de la 55a Universala Esperanto-Kongreso 1970 en Vieno. Li diris i.a.: "Estas vero, ke la moderna tekniko helpas faciligi la taskon de la profesiaj tradukistoj dum kongresoj, sed ne pli. Iliaj teknikaj aparatoj estas maltaŭgaj ludiloj kompare kun la mondvasta farenda tasko, nome superi la lingvajn barojn inter la popoloj, inter milionoj da homoj. Tial la esperantistoj nuntempaj devas pensi kiel realistoj, ili devas pli varbi kaj per novaj rimedoj. Ili turnu sin ĉefe al la junularo, al ĉiuj interesuloj, ankaŭ al ĉiuj kiuj estas respondecaj por la bonstato de la popoloj kaj ŝtatoj. Sed ĉar mi mem en tiu rilato faris multe da spertoj, mi avertas vin: ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la Esperanto-movado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon.....Esperanto ĝis nun sukcese trapasis ĉiujn ekzamenojn, al kiuj ĝi estis submetata flanke de scienco kaj tekniko, de politiko kaj komerco, de pedagogio kaj literaturo. Kian pruvon do pri la taŭgeco de Esperanto la dubantoj krome bezonas? Nur la propran sperton, propran sperton anstataŭ malsaĝa antaŭjuĝo!"

Laŭ Radio Vieno la prezidanto de UEA, prof. Ivo Lapenna, sendis kondolenctelegramon al la Aŭstria Esperantista Federacio, same kiel Esperanto-societoj el Francio kaj Italio. Radio Varsovio dediĉis al prezidento Jonas mallongan memorelsendon kun citaĵoj originalaj el lia Viena parolado. Ankaŭ la Esperanto-elsendoj de Vieno kaj Zagreb dediĉis honorigan memoron al la mortinto.

## Hermann Behrmann nova 1-a parolanto

Wiesbaden (hb/pp) Dum la 12-a simpozio de la Asocio pri Programita Instruado, okazinta de la 17-a ĝis la 20-a de aprilo 1974 en Wiesbaden, FRG, estis fonditaj du novaj laborgrupoj interne de la Asocio.

La unuan grupon "Klerigekonomio kaj klerig-organizado" gvidas Prof. D-ro Wolfgang Arlt, Berlino (Okc.), la alian grupon "Interlingvistiko kaj lingvocibernetiko" (germanlingva mallongigo ILUS) estras Hermann Behrmann, prezidanto de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj kaj kreinto de Esperanto-programita. (Cetere, ambaŭ grupoj fondiĝis laŭ iniciato de Prof. D-ro Helmar Frank.) Kiel duan parolanton de la ILUS-grupo oni elektis la matematikdocenton D-ro Hans Kasselmann, estro de la Esperanto-laborrondo ĉe la Universitato Paderborn.

Laŭ Hermann Behrmann la ILUS-grupo ĉefe okupiĝos pri la eblecoj de internacia kunlaboro sur la klerig-teknologia kampo, pri tradukado de komunikoj inkl. la lingvocibernetikajn demandojn, kiel aŭtomata tradukado, planlingvoj ktp.

Dum la simpozio Hermann Behrmann kaj D-ro Hans Kasselmann prelegis pri Esperanto-temoj. Krome Esperanto estis tuŝita en la asemblea prelego de la pola sciencisto Jarmak el Poznań.

La ILUS-grupo aranĝis en Wiesbaden apartan aranĝon en hotelo Blum, kie sub gvido de Hermann Behrmann sep sciencistoj, i.a. Helmar Frank, parolis pri siaj novaj esplorrezultoj. Prelegis ankaŭ Günther Becker kaj D-ro Hans Michael Maitzen, kaj ekspoziciis Esperanto-librojn Ludwig Pickel. La salono estis plenplena.

La ILUS-grupo serĉas kontaktojn al orienteŭropaj landoj, ĉar ĝi volas iniciati interŝanĝon de resumoj en reto de 5 - 7 diversaj cibernetikaj resp. klerigteknologiaj revuoj. Ideo de Prof. D-ro Frank estas, ke ĉiu el la kunlaborantaj revuoj publikigu resumojn de artikoloj el la ceteraj revuoj. Esperantistoj disponantaj pri kontaktoj al tiaj revuoj resp. kapablaj por traduki sciencajn artikolojn en Esperanton, bv. turni sin al Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1.

## Esperantistoj atakitaj

Sheffield (ps) Kelkaj britaj esperantistoj estis trafe atakitaj de sia propra prezidanto en la 58-a Brita Kongreso de Esperanto en Sheffield dum pasko. Li nomis ilin kiel unu el la kialoj ke Esperanto ne estis akceptita post 60 jaroj da kampanjado. S-ro Grahame Leon-Smith, prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, diris ke kelkaj esperantistoj ne deziras ke la lingvo fariĝu ĝenerale uzata, ĉar tio detruus ilian "amatan ĉevaleton" se amaso de aliaj homoj scipovus la lingvon.

## Radio-kurso prezentita al Studenta Radio


Tutnova radio-kurso, kiun pretigis "Grupo Kvin: Esperanto en la Radio kaj Televido" estis transdonita dum la 58-a Brita Esperanto-Kongreso al reprezentanto de Universitata Radio Essex. La studentoj komencos la disaŭdigon en majo.

## Nuda inter lupoj

Lejpcigo. (pp) Aperis nun la jam antaŭe anoncita Esperanto-traduko de la romano de Bruno Apitz "Nuda inter lupoj", kiu rakontas pri la sorto de pola infano en la koncentrejo Buchenwald dum la lasta periodo de la milito. Formato 12,5 x 19,5 cm, bind., 480 paĝoj, prezo 12,- DM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

*Ĉina Esperanta monata gazeto*

# EL POPOLA ĈINIO



Varbas abonantojn de 1974

Abonprezo: 1 jaro 6,- GM
2 jaroj 9,- GM
3 jaroj 12,- GM

Abonu ĉe
Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1
Postfach 2113
PSchK Nürnberg 819 56-851

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla senpage

## Esperanto-elsendoj el Sofio

Pilo-Press fakte malatentis ĝis nun la Esperanto-elsendojn de Radio Sofio. Unu aŭskultanto, s-ro Max Waclawek, Dinslaken, hazarde trovis la stacion sur ondo 31 m dimanĉe matene je la 9,30 h. Pilo-Press nun mem trovis kaj povis konstati, ke la elsendo estas relative bone ricevebla. Oni disaŭdigas informojn el Bulgario en la unua parto kaj popolan muzikon el Bulgario en la dua. Sofio elsendas ankaŭ dimanĉe vespere je la 21,05 - 21,30 h sur ondo 50 m.

## 30a Internacia Junulara Konferenco (IJK)

Münster (pp) Kiu volas ankoraŭ partopreni la ĉijaran IJK, devas rapidi. La konstante kreskanta nombro de aliĝintoj lastatempe atingis 150. Samtempe kreskis ankaŭ la internacieco de la konferenco en Münster. Junuloj el 25 landoj intertempe sin anoncis. Detaloj pri la programo sekvos en la sekvonta numero de PP. Konstanta adreso: 30a Internacia Junulara Konferenco, D-4400 Münster, Mondstr. 3

## Friedrich Volk 80-jara

Würzburg (pp) Friedrich Volk, sekretario de Esperanto-grupo Würzburg, festis sian 80-an naskiĝtagon la 15-an de aprilo 1974. Dum pli ol 50 jaroj li estas aktiva esperantisto. Lia merito estas interalie la novfondiĝo de la Esperanto-grupo Würzburg post la milito, kiun li gvidis dum multaj jaroj. Li ĉiam estas fervora kunlaboranto kaj preta transpreni necesajn taskojn. Multajn internaciajn kongresojn li partoprenis kaj havas konatojn kaj amikojn en la tuta mondo.

**********

Pilo-Press: Eldonanto kaj redaktoro Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, aperas ĉiusemajne. Jara abonkotizo 30,- GM
PSch Konto Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579

SENPAGE AL POLLANDO !

Senpagan rondvojaĝon tra Pollando kaj multajn objektajn premiojn oni povas gajni en la nova konkurso-enketo de la Pola Radio.

Por partopreni en la lotado de la premioj oni devas respondi al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. Kioman lokon, laŭ via opinio, Pollando okupas en la mondo laŭ la vidpunkto: de la areo de la lando, nombro da loĝantoj, industria produktado?

2. Kiuj polaj varoj kaj servoj ĝuus sukceson en via lando? Kiuj pliaj ebloj, laŭ via opinio, ekzistas en ĉi tiu sfero?

3. Kion vi opinias pri la aktuala rolo de Pollando en Eŭropo kaj en la mondo?

La respondojn oni sendu laŭ la adreso: <u>POLA RADIO, Esperanto-redakcio, 00-950 Varsovio, P.O. Box 46, Pollando</u>, ĝis la 15 de junio 1974 /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso-enketo estos anoncitaj en la elsendoj de la Pola Radio la 30-an de junio 1974.

Ni deziras al vi bonŝancon en la lotado de la premioj!

Samtempe ni informas, ke la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio estas aŭdigataj tri fojojn tage:

| | | |
|---|---|---|
| 6,00 h. | ondolongoj: | 200 m, 31 m, 49 m |
| 16,30 h. | ondolongoj: | 31 m, 41 m |
| 22,30 h. | ondolongoj: | 200 m, 49 m |

La elsendo-horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo.

Al ĉiuj esperantistoj ni volonte disponigos la presitan program-informilon pri niaj Esperanto-elsendoj.

POLA RADIO